Vi lernos:

estis
estas + ita(j)
estos

Ekzemploj:

⇒ La banko est**a**s **fermita** nun. (ĉar estas la 11a nokte)

⇒ La banko est**i**s **malfermita** antaŭ 12 horoj. (ĉar estis la 11a matene)

⇒ Morgaŭ matene la banko, kiel kutime est**o**s **malfermita**.

Aliaj ekzemploj:

1 La fama libro Don Kiĥoto estis verkita de Cervantes, hispana verkisto.
2 Morgaŭ nia televidilo kiu paneis antaŭ tri tagoj estos riparita.
3 La ĉambro estas hela nun ĉar la lampoj estas ŝaltitaj.
4 La forflutruo de la lavkuvo estas ŝtopita, do ni devas malŝtopi ĝin.
5 Ties domo estas tre nova. Ĝi estis konstruita nur lastjare.
6 Estos instalita venontsemajne la nova komputilo kiun la firmao aĉetis.
7 Ĉu la kranoj de la banujo estas fermitaj aŭ malfermitaj?
8 Alveninte hejmen, li kroĉis sian jakon sur la hokon. Nun lia jako estas kroĉita sur la hoko

Prinotu:

1 Hieraŭ mi vendis mian malnovan aŭton.
⇒ Mia malnova aŭto estis vendita hieraŭ (de mi).

2 Pablo mendos la lernolibrojn de la libroservo de Esperanto.
⇒ La lernolibroj de la libroservo estos menditaj de Pablo.

3 La muzikvendejo liveris mian pianon antaŭhieraŭ posttagmeze.
⇒ Mia piano estis liverita antaŭhieraŭ de la muzikvendejo.